

Tra la Mondo

Tutmonda ilustrata Revuo esperantista

TRA-LA-MONDO-ESPERANTO-SEMAS-SIAJN-BONAĴOJN-
PLI-FACILIGAS-LA-KOMERCAJN-INTERRILATOJN-KONIGAS-
LA-INDAJN-ELTROVOJN-KUNHELPOS-POR-ANSTATAVI-
DE-FRUKTODONA-PACO-LA-SANGAJN-BATALADOJN-
KIUJ-DISSTRAS-HOMARON.



Alegorio speciale verkita de Sanjoro Pillet, fama gravuristo de medaloj, sendita en la francan Roman lernejon post ricevo de 1^a granda premio.

Jara abonkosto : 8 frankoj, ĉiulande. — Kvaronjara abonkosto : 2.25 fr.

ĜENERALA PLANO KAJ ENHAVO.

Paĝo.

Nuntempaĵoj: Malantaŭen rigardo al la Rusa-Japana milito. Artikolo verkita per nepresitaj leteroj de generalo Levitskij (MANĴURIO); Poŝtnikov (SIBERUJO); Klimov kaj Porfirjev (RUSUJO)	49 ^a
Pri Esperanto: Eĥoj de l' Buloŝa Kongreso: Stenogramo de Pastro Schneeberger, Prez ^o de la Svisa esperantista Societo, el Laufen (Svisujo). — Kroniko, de Sino Danne. — Bibliografio, de Legadamiko (FRANCUJO)	59 ^a
Gejunula paĝo: La brava hundo Shippeitaro, populara JAPANA RAKONTO, tradukita de D ^{ro} Gambier, el Loudun (FRANCUJO)	61 ^a
Felietono: Rememoroj, de Kazi Girej (SIBERUJO)	63 ^a
Miksaĵoj: Por la propagando, amuzaĵoj, ludoj, k. t. p. de Ch. Brunet.	64 ^a bis

REPRESO DE ARTIKOLOJ KAJ ILUSTRAĴOJ.

Kelke da niaj kunfratoj esperantistaj kaj ne esperantistaj esprimis al ni la deziron represi niajn artikolojn. Ni volonte tion permesas por artikoloj sed ne por ilustraĵoj, konŝiĉe ke oni ĉiam sciigu la devenon de tiuj artikoloj, aldonante la adreson de l' administracio kaj la plenajn prezajn kondiĉojn:

JARA ABONO: En ĉiuj landoj: 8 fr. — **KVARONJARA ABONO:** 2 fr. 25 c.
UNU NUMERO, AFRANKITA, 0 fr. 75 centimoj.

Escepte por pago de specimenoj, oni akceptas poŝtmarkojn — *po 3/4 de ilia valoro* — sed nur el landoj ne havantaj internaciajn mandatojn.

REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO.

Sendi ĉiujn dokumentojn (*krom miksaĵoj*) al S^o Montrosier, 74 Faubourg Bannier, Orléans, (France). Miksaĵoj, t. e.: ludoj, amuzaĵoj, problemoj kaj solvoj devas esti sendataj al S^o Brunet, 59, Cours Victor Hugo, Bordeaux, (France).

Sendi mendojn KUN MONO al:

Administranto de « Tra la Mondo », 15, Boulevard des Deux Gares, Meudon (S. et O), France.

Profitoj oferataj de « Tra la Mondo ».

« Tra la Mondo » volas ne sole utili propagandon, generale, sed ankoraŭ volas helpi propagandistojn, ofte haltigatajn de manko da mono. Kiu varbos ses abonojn ricevos sepan senpage, t. e. valoron da 8 frankoj, kaj tiel *po ĉiu serio da ses abonoj*.

Plie GRANDA KONKURSO estas de nun malfermita. Tiu ajn, izolulo aŭ grupo, kiu varbos plej grandan nombron da abonoj ĝis la 31^a de decembro (almenaŭ 30) ricevos 50 frankojn mone. Kunkalkulante la antaŭan profiton, estas do PREMIO DA 90 FR., tre utilaj por la propagando.

Oni jam legis pri aliaj konkursoj.

Oni povas MENDI ĈE « TRA LA MONDO » ĉiujn librojn kaj gazetojn esperantajn. Mendoj estos ĉiam rapide plenumataj.

Aparte oni povas aboni je « Gefratro esperantista » (4 fr. ĉiujare); kaj « Espero katolika » (2 fr.) Sufiĉas aldoni 10 centimojn je la kosto de l'abono aŭ de l'volumo.

Pro la pli kaj pli kreskanta nombro de ricevataj petoj pri sciigoj, ni, estonte, respondos nur kaj nepre je petoj akompanataj de poŝtmarko por la respondo.

Ni petas personojn, kiuj ne havas tre gravan kaŭzon por alie agi, aboni kaj abonigi senpere ĉe nia administracio.

DANKOJ!

Tre kore ni dankas: Frinon Lilian Holt, Sojn Chitty Mildura, Dovero, kaj Christen, Aberdeen, kiuj proponis al ni diversajn Nojn de « The British Esperantist ». Ni ne plu bezonas la petitajn kajerojn, tute ricevitajn de S^o Lyndridge, Lea, sed nur la Nojn de « Suno Hispana ».

Dankojn ankaŭ al Soj Vicente Inglada kaj Jimenez Loira pro iliaj sendaĵoj kiuj estos presataj; al S^o Codorniu kaj Rufino Unzaga, kun nia bedaŭro pri manko da loko, kiu ne ebligis nin enpresii iliajn ĉojn.

Inter multaj favoraj artikoloj dediĉitaj al « Tra la Mondo », ni devas specialan citon al tiuj de « Lingvo internacia » en la 17^a n^o (1^{an} de septembro); « Stockholm Bladet » de nia konata propagandisto Paul Nylén, kiu dediĉis duonkolonon de tiu grava kaj granda ĵurnalo al nia revuo; fine el la 9^a n^o de l' franca « Esperanto » ni enpresas tie ĉi la ĉefan parton de l' tute favora artikolo dediĉita al ni de So Lambert, kies nomo estas universale konata pro lia esperantista delonga agado, precipe en la lernanta mondo; kaj nun pro la fondo de « Esperanto »:

« Tra la Mondo. — Ĉu ia ilustrata revuo esperanta estas bezonata? Ĉu Tra la Mondo respondas al tiu bezono?

Mi sensancele respondas: jes

Esperanto precipe celas la interkomunikon de ĉiuj landoj; ĝi lingve dejetas la barojn de la landlimoj kaj permesas ke la diversalingvuloj sin vizitas aŭ korpe aŭ letere aŭ spirite. Multaj esperantistoj vojaĝas en alilandon; multaj korespondadas kum fremduloj. La bonegaj revuoj esperantistaj disse-

mas ĉien tra la mondo la penson de la tuta homaro; ili estas kvazaŭ la ligiloj de la spiritoj de la tutmonda esperantistaro. Niaj ordinaraj revuoj estas la ĉefaj subteniloj de esperanto.

Tamen la esperantistoj deziras ankaŭ plu: ĉar esperanto enpenetras ĉien, ili volas per esperanto ne nur pensi kun alilanduloj, sed koni kaj *vidi* ĉion kio fariĝas en aliland. Ili pensas: se vi, esperanto, dejetas la barojn, vi devas *montri* al mi ĉion kio estas trans la baroj.

Tial ni bezonas revuon kies celo estas montri la vivadon de la tuta mondo, vivon komunan, historian, politikan, artistan, kc., kaj ne nur montri per paroloj sed ankaŭ per figuraĵoj, ĉar tiel postulema estas la nuna kutimo ke oni volas *vidi* la plej fidelan ŝajnon de la vivo.

Necesa ankaŭ estas ilustrata revuo por la propagando de esperanto. Se ia neesperantisto renkontas nur vortan revuon, li rigardas senhalte la titolon, kaj ne komprenante daŭras sian marŝadon. Sed antaŭ ilustrita revuo li haltos, li rimarkos la fotografiaĵojn, li interesos pri ili, li legos la akompanantan tekston, li jam tuŝos senatente esperanton mem.

Tiun celon devas atingi ilustrita revuo esperanta. Ĝin atingas Tra la Mondo. Per belaj fotografiaĵoj ĝi promeniĝas nin tra la mondo. Ĝi egalas valore la plej bonajn ilustritajn revuojn naciajn ».

Kaj por pravigi tiun opinion, S^o Lambert citas la diversajn artikolojn jam presitajn en niaj kolonoj. Pli kaj pli, la estonto lin pravigos:

En preparado { Belega kristnaska } numeroj!!
{ Sensacia novjara }



Kopiraĵo

PORT-ARTURO.

Malantaŭen rigardo al la Rusa-Japana milito

de AŬGUSTO MONTROSIER.

Antaŭ la militdeklaracio.

Oni memoras pri la kaŭzoj, kiuj naskis la militon finintan antaŭ nelonge.

Japanujo opiniis, ke la sendependeco kaj la netuŝebleco teritoria de Koreujo estas necesaj por la japanaj utiloj; la okupado de Manĵurio malgraŭ

la promesoj pri eliro, la rusa agado ĉe l' bordoj de Jalu, al ĝi ŝajnis esti danĝero.

La 28^{an} de Julio 1903, S^o Komura, ministro de l' japanaj fremdaj aferoj, ordonis al S^o Kurino, ministro de Japanujo en Peterburgo, komenci interparoladojn celantajn konsenton pri tiuj punktoj.

La 3^{an} de Aŭgusto 1903, depeŝo al Tokio formulis tiel la japanajn proponojn.

1° Reciproka promeso respekti la sendependecon kaj la teritorian netuŝeblecon de Ĥinuĵoj kaj de l' korea imperio, kaj tie konservi la principon de l' « malfermita pordo. »

2° Reciproka konsento pri la superaj interesoj de Japanujo en Koreujo kaj pri la rusaj interesoj en la entreprenoj de l' fervojo en Manĵurio; rajtoj por Japanujo kaj Rusujo fari la neceson en tiuj du landoj por defendi siajn interesojn, ne preterpasante la promesojn faritajn en la 1^a paragrafo.

3° Reciproka promeso ne malutili la komercajn entreprenojn de Japanujo en Koreujo kaj de Rusujo en Manĵurio; promeso de Rusujo permesi plilongigon de korea fervojo en Manĵurion, kaj ĝian kunigon kun la fervojo de Ĥinoriento.

4° Promeso sendi militistarojn japanajn en Koreujon, rusajn en Manĵurion nur laŭ necesoj kaj ilin elirigi tuj post restarigo de l' ordo.

5° Akcepto de Rusujo pri la ekskluziva rajto por Japanujo konsili kaj helpi la korean regnon en ĝiaj reformoj civilaj kaj militaj.

6° Neniigo de l' antaŭaj konsentoj.

La 3^{an} de oktobro, la rusa ministro ĉe Tokio, prezentis la jenajn kontraŭ-proponojn.

1° Reciproka promeso respekti la sendependecon kaj la netuŝeblecon teritorian de Koreujo.

2° Akcepto de Rusujo pri superaj interesoj de Japanujo en Koreujo, pri ĝia rajto helpi la korean regnestraron en ĝiaj reformoj.

3° Rusa promeso ne kontraŭstari la industriajn kaj komercajn entreprenojn japanajn en Koreujo, nek la protektajn rimedojn por ĝiaj interesoj en la limoj de l' unua paragrafo.

4° Akcepto de l' rajto por Japanujo sendi militistarojn Koreujon en la kondiĉoj diritaj en la 4^a paragrafo de l' japanaj proponoj.

5° Reciproka promeso ne utiligi Koreujon por militartaj celoj, ne konstrui fortikaĵojn eblajn konstruistari la liberan marveturon trans markoloj.

6° Reciproka promeso konsideri la parton de l' korea teritorio norde de l' 30^a paralelo kvazaŭ neŭtralan regionon, kien neniu el la kuntraktantoj povas enkonduki militistarojn.

7° Akcepto de Japanujo, ke Manĵurio kaj ĝia marbordo estas ĉiurilate ekster ĝia influa sfero, kaj neniigo de l' antaŭaj konsentoj.

Japanujo ne volis akcepti la 7^{an} paragrafon de l' rusaj proponoj kaj ĝin rifuzis la 30^{an} de oktobro. Fine la 13^{an} de Januaro 1904, Japanujo proponis siajn lastajn postulojn, petante tujan respondon.

1° Eligo el la 5^a rusa paragrafo de l' vortoj: « ne utiligi Koreujon por militartaj celoj. »



Kopirajto

RUSUJO KAJ JAPANUJO AMINDUMAS KOREUJON.

2° Forigo de l' 6^a rusa paragrafo.

3° Akcepto de l' 7^a paragrafo kondiĉe ke:

a) Rusujo respektos la teritorian netuŝeblecon en Manĵurio.

b) Ke ĝi lasos por Japanujo kaj por aliaj ŝtatoj, en Manĵurio, la rajtojn al ili aljuĝitajn per la antaŭaj traktatoj kun Ĥinuĵoj.

c) Ke ĝi konsentos, ke Koreujo kaj ĝia marbordo estas ekster la sfero de l' rusaj interesoj.

Ĉar la Rusoj ne faris tujan respondon, la 6^{an} de Februaro, S^o Kurino sciigis pri la rompo de l' konsentprovoj.

La preparadoj.

Dum tiu longa tempperiodo, la batalontoj ne estis neagantaj.

Samtempe kiam Rusujo koncentrigas siajn marajn fortojn en Ekstremorienton, ĝi alveturigas Manĵurion terajn armeojn. La 2^{an} de Januaro 1904, admiralo Alekseief, leŭtenanto de Caro en Ekstremoriento, jam provizita je plenaj povoj, ricevas specialan flagon (sur blanka fundo kuŝas la blua kruco de S^{to} Andreo kun nigra aglo.)

Ĉe Japanoj, preparadoj pli signifaj ankoraŭ: aĉeto po 37.500.000 fr. de du Argentinaj ŝipoj *Rivadavia* kaj *Moreno*; kreo de supera milita konsilantaro sub prezidanteco de Mikado; disponebleco donita al regnestraro de l' rezervmono ĝis valoro da 100 milionoj da « *Jen* ».

Japano estas insularo; la kaptajo, kiun ĝi avidas, Koreujo, estas duoninsulo de l' Azia kontinento: la milito estos, antaŭ ĉio, ŝipa milito.

Por siaj agoj, Rusujo posedis du « bazojn » (Havejoj utiligeblaj por la enŝipiĝo, provizado kaj, okaze, la rifuĝo) grandvalorajn: Vladivostoko kaj Port-Arturo. Post la fluidiĝo de l' glacio, la dua, timindega fortikaĵo, kun Dalny, nova komerca haveno kaj fino de l' fervojo, estis la centro de l' rusa potenco en Ekstremoriento.




Kopirajto

ADMIRALO ALEKSEIEF.

Japanujo, krom la grandega rodo formita de ĝia interna maro, enpreata de l' tri grandaj insuloj *Nippon*, *Sikok* kaj *Kiu* sin posedis armeilejojn unuarangajn.

Pri la ŝiparoj, Rusujo havis profiton de l' nom-



Kopirajto

JAPANAĴ MARISTOJ.

bro kaj armado pri la kirasŝipoj, kaj Japanujo pri la kiraskrozŝipoj.

Sed ĉu la valoro de l' ŝiparoj estis egalaj, ĉu la situacio sur tero estis favora por Rusujo? La sekvanta eltranĉaĵo de letero skribita al mi de rusa oficiro, kelke da tempo post la komenco de l' militaĵoj, mirinde elmetas la situacion.

Vladivostoko, II/18-2/5, 1904.


« Milito komenciĝis... Kian rezultaton ni povas atendi? Sendube, dum unuaj tagoj, Japanujo havos grandajn superaĵojn:

a) Iniciativon: ĝi havas difinitan celon; Rusujo ne tion povas. Ĝi devas « renversi » japanajn planojn, sekve ĝi devas antaŭe diveni ilin aŭ atendi ilian plenumadon kaj nur poste agadi.

b) Ĉiuj japanaj landoj kaj maraj fortoj estas apud la celo de ilia agado; kontraŭe, Rusujo havas apud la teatro de militaj manovroj nur 1/10 de siaj fortoj, kaj ceteraj 9/10 troviĝas tre kaj tre malproksime.

Eĉ tiu 1/10 de rusa armeo, kiu tie ĉi estas, postulas grandan daŭron da tempo por esti koncentrigata; kaj sendube, nur batalante laŭ kutimaj al rusa soldato decideco kaj obstineco, ĝi povos sin teni kontraŭ kvinoble pligranda japana armeo, dum rezervoj el Rusujo estos veturigataj.

Sekve, se eĉ dum la tri aŭ kvar unuaj monatoj rusaj taĉmentoj ne havas sukceson, ni



Kopirajto

RUSAĴ MARISTOJ.

neniel estos senkuraĝigitaj. Ni estas pretaj je tio, kaj nur nin preparas montri, ke unu rusa soldato ne estas unu ĥina, sed « iomete » plu. Kaj poste... ĉiu el ni estas konvinkita pri la plena sukceso de rusa armeo, eĉ se tuta ŝiparo pereus en bataloj kun japanoj aŭ iliaj liganoj... »

F. POŠTNIKOV.

Tiun konvinkon ĉiuj posedis, kaj tre malmultaj estis tiuj, kiuj, komence de la milito, ne kredis je fina sukceso de l' militaĵoj.

Kio ajn estis, tiu letero mirinde resumis la komencan situacion kaj krom unu punkto, ĝi estis vera antaŭdiro.

La Kontraŭmilitaĵoj.

Ni vidis ke, la 6^{an} de februaro, ĉar Rusujo ne respondis pri postuloj japanaj, S^o Kurino estis

rompinta la konsentprovojn.

Dum la nokto de l' 8^a ĝis 9^a, Japanoj komencis militaĵojn sen antaŭa militdeklaro. Iliaj torped-ŝipoj surprizis, en la interna Port-Artura rodo, la eskadron rusan kaj difektis tri el ĝiaj unuoj el la plej novaj kaj belaj tipoj de l' rusa ŝiparo: *Retvisan*, *Cesareviĉ*, *Fallada*.

La Japanoj daŭrigis ageme sian profiton:



Kopirajto

GEJAPANOJ LEGANTAJ SCIIGOJN PRI LA MILITO.

1° Kelke da horoj post la mara surprizo, 15 kirasŝipoj kaj krosŝipoj montriĝis kontraŭ Port-Arturo kaj bombardis la fortikaĵon. La rusaj ŝipoj kaj marbordaj baterioj reatakis kaj forpelis la japanan ŝiparon. Perdoj estis seriozaj ambaŭflanke.

2° Alia japana divizio renkontis ĉe Ĉemulpo kanonŝipon *Korietz* kaj krosŝipon *Variag*. Post heroa kontraŭbatalado, ambaŭ estis dronigitaj.

3° Ekokupo de Koreujo komencis ĉe kvar punktoj: Ĉemulpo, Mazanfo, Fuzan'o, Ĵensan'o.

Kompreneble, tiuj okazintaĵoj, la neatendita atako de Japanoj naskis malfavoran impreson en la tuta mondo kaj indignon en Rusujo.

Pri tiu punkto, jen estas letero, kiun mi ricevis

de alia rusa oficiro.

Kazan, III/19-6.

«... Tio ĉi estis tiel subita kaj tiel terura, ke ĉia rusa homo sentis sin mem terure ofendita. La malica aziana atako kiel elektra fajrero ekflamigis rusan popolon; kaj ĝi ne trankviliĝos ĝis tia tempo, kiam ĝi vengos sin je l' malica malamiko.

Tuta Rusujo ekleviĝis kiel sola homo, kaj estas preta oferi ĉion, kion ĝi havas. Ĉiuj internaj malpacoj forgesiĝis: Slavoj, Tataroj, Finoj, Hebreoj kaj ĉiuj ceteraj popoloj vivantaj en Rusujo unuanime oferas havon, monon kaj vivon por defendi la honoron de sia patrujo.....»

Almenaŭ en sia malfeliĉo, Rusujo konis feliĉan horon de unuigo. Ĝi ne devis daŭri. Sed en tiu ĉi momento, ĉiuj komuniĝis ankoraŭ en la sankta amo de Patrujo.



Kopirajto

RUSA MOBILIZADO.

«... Ni estas pretaj je ĉio. Unuaj malprosperoj de nia ŝiparone mallevis niajn spiritojn: nia ŝiparo en Port-Arturo estas malpli forta ol la japana; ni ĝin scias kaj grandajn esperojn sur ĝi ni ne metas kvankam ni estas certaj pri la kuraĝo de niaj maristoj, kiuj ĝin montris en batalado ĉe Ĉemulpo sur krosŝipo Variag kaj ankaŭ en lastaj bataloj apud Arturo.»

KLIMOV.

Pri la heroo defendado de tiu malfeliĉa ŝipo, mi povas ankaŭ citi eltiraĵon el letero, kiun mi ricevis de generalo Levitskij, tiel konata de la Esperantistoj.

«...En ia momento de l' batalo ĉe Ĉemulpo, en malsuprafardeko de l' ŝipo Variag, dum tri minutoj ne plu estis aŭdata la ordona voĉo de komandanto Rudnev. Inter maristoj komencas iradi informo, ke Rudnev mortis. Tiam tiu ĉi lasta, el amaso da falintaj granatoj, alkuras al maristoj kaj ekkrias: *fratetoj, mi estas ankoraŭ viva, celu pli akurate.* Kaj denove pafegado pli grandigas el flankoj de Variag.

Kiam el tridek artileristoj, meze de l' batalo, restis nur *tri* soldatoj, tiam pafilegoj devis ĉesi: sian laboron. Juna oficiro (miŝipmano) Balk, ekrigardinte tion, rapide komencas transkuradi de unu pafilego al alia, anstataŭante soldatojn pereintajn en tiu neegala batalo. Kaj denove pafegado pli grandigas el flankoj de Variag.»

Generalo LEVITSKIJ.

Tiuj du anekdotoj montras senfrazo la heroismon de l' unuaj ŝipbatalantoj rusaj; kaj la rekanto, kiu finigas ambaŭ, havas veran epopean karakteron.

Dum tiuj okazintaĵoj elvokis indignon kaj doloron en Rusujo, ili naskis ĝojegon bruan en Japanujo. Ĵurnaloj kaj afiŝoj estis avide legataj. Oni preparis festojn kaj jam triumfaj arkajoj estis starigataj por festi la cedon de Port-Arturo, kiun ekvenkintoj opiniis tuja. La flagaroj kaj ornamaĵoj atendis ĝin longe dank' al neordinara kaj heroo defendado, kiu instigis admiron de l' tuta mondo.


Sed nun, ambaŭflanke, oni preparigas por daŭrigi la militon.

La afero estis simpla por Japanoj, nun superaj sur maro kaj proksimaj je sia lando; sed estis tute alie por Rusoj:

«... Nia embaraso staras tute en tio, ke tre malproksime estas la milita teatro: je 10 miloj da kilometroj, kaj ni ne povas rapide kolekti multe da militistoj por dispremi malamikojn.

Sed tio ĉi fine okazos, malgraŭ ĉiuj penadoj kaj multe da oferoj je homoj kaj mono.»

Ageme, oni laboris por fini la fervojon kaj transigi ĝin sur glacio de lago Bajkalo. Pri la traŝiro sur la lago, mi ricevis ankaŭ interesajn sciigojn de generalo



Kopirajto

JAPANA MOBILIZADO.

Levitskij kun fotografajoj, kiujn, bedaŭrinde, mi ne povas enpresigi pro manko da loko.

« La vagonoj, trenataj de du aŭ tri ĉevaloj, moviĝis sur reĵoj, sinsekvantaj unu la alian je interspaco da 150 ĝis 200 metroj. Dum du monatoj suriris tiel la glacion de Plago 70 lokomotivoj kaj 3000 vagonoj. Kiam glacio iĝis nesufiĉe dika kaj fortika por elporti grandan pezon, oni uzis glitveturilojn, fine grandan vaporŝipon kapablan porti tutan vagonaron da 35 vagonoj.

La interspaco malkuniganta stacidomojn Baikalo kaj Tanĥoj havas 45 kilometrojn. Soldatoj, vintre, trairadis tiun ĉi interspacon en unu tago, piede, havante meze de l' lago ripozon da du — tri horoj, en hotelo tie konstruita; kaj ili ricevis en ĝi varman nutraĵon. »

Post la unua vintro oni povis uzi la fervojon, kiu estis surterigita ĉirkaŭ la lago.

Manĵurio.

Nun ni parolu iom pri la milita teatro kaj ĝia klimato.

Ankoraŭ unu aktoro de l' longa kaj terura dramo sciigos nin pri ĝi.

Mukden'o, 20 II-05.

« Vintro en Manĵurio estas ĉarma; plej ofte regas ĉiam ĉara, suna vetero, kvankam la frostoj, precipe dum nokto, estas granda, eĉ grandega. Se ne estus norda vento kaj terura polvo, kiun levigas tiu ĉi granda vento, vintre la vetero povus memorigi paradizon, tiel agrabla ĉarma aero estas disversita en spaco.

Cetere en tiu ĉi sovaĝa lando, nur bona estas la vetero; ĉar la vivo de loĝantoj kaj iliaj moroj tiel estas ne similaj al la moroj kaj kutimoj de Eŭropanoj, ke ili ne povas plaĉi al tiuj lastaj.

La popolo, en la malvasta senco de tiu vorto, t. e. popolamaso, estas tre malriĉa, tre malpura, tre malbone vestita, kvazaŭ per ĉifonoj, kun regno de blua koloro. Malfeliĉa popolo kaj parto de l' mondo! »

Pli malfrue, generalo Levitskij malpli ŝatos vintron, ne sufiĉe neĝan!

Gunĉjulino, 7/VII/05.

« ... Ĉu oni povas ĝui Manĵurian naturon? Mi opinias ke ne, almenaŭ mi ne povas ami ĝin, ĉar ĝi estas kripla. Rigardu: kvankam dum la vintro frostoj furioziĝas, ne neĝas; apenaŭ iom ekpolviĝas per neĝo la montetoj. Por rusa rigardo tio ĉi estas kripla vintro, ĉar vera devas havi lanugan, profundan neĝon. Tie-ĉi estas nur malbona simileco al vintro... »

Tio, kio estas bela en Manĵurio estas la nokta ĉielo, ornamita de multenombraj steloj... sed ĝi ne estas ĉi tiea... ĝi apartenas al la tuta mondo.



Kopirajto.

SUR LAGO BAIKALO.

Eble Kreinto zorgis ornami la supernuban altecon por ke batalantoj kun plezuro rigardu la stelojn, ne bedaŭrante disigi de malsincera tero. »

Tio, kion ne diras tie ĉi mia poezia korespondanto, estas ke rabistoj « Tunguz » ankaŭ malagrabligis la landon. Kaj tamen li estis bone lokita por ĝin scii, ricevinte mision gardi la komunikan vojon de l' armeo de generalo Kuropatkin.

Generalo Kuropatkin.

Mi ne intencas paroli tie ĉi pri ĉiuj okazintaĵoj, kiuj signis komandadan daŭron de tiu malfeliĉa generalo. Ŝajne, li antaŭvidis parte sian sorton kiam, tute glorigata, li forlasis Rusujon por estriĝi en Manĵurion. Jen estas, ja, la paroloj de li diritaj al barono Frederiks, grava persono de l' Rusa kortego.


« Jes, mi ĝin scias, oni konfidas al mi. Oni tro konfidas. Oni esperas tro de mi. Mia vivo disvolviĝas same kiel horizonta linio ĉirkaŭ kiu sorto desegnas arabkurbojn. Nune mi estas ĉe punkto tre alta super la linio. Poste mia kurbo fleksiĝos, trafos la linion kaj ĝin subiros: estos la tempo kiam, atendante miajn soldatarojn, ne povante agi, mi restados senmova tie kaj kiam la publika opinio sin demandos ĉu ĝi ne eraris fidante je mi. Fine, mia kurbo realtiĝos, transpasos denove la linion kaj mi havos miajn revengojn; sed, tamen, estos pasinta por mi periodo akra elporti. »

« LE FIGARO » 24^{an} de Marto 1904.

Ve! la suprenaliro de l' kurbo estis ne venonta. Sed, malfeliĉe, la unua parto de l' diroj okazis.

Oni memoras kiel, malsupera je nombro, Kuropatkin faris metodon returnmarŝadon por altiri la malamikon (1^{an} Armeon, Kuroki), for de l' rivero Jalu, en pli favorajn ebenaĵojn de Manĵurio. Troa kontraŭbatalado de generalo Zassouliĉ igis ĝin malfeliĉega. (26^{an}-30^{an} de Aprilo 1904).

Post tiu batalado, Rusoj returnen formariĝas sur



Kopiraĵo

STACIDOMO DE TRANSSIBERUJA FERVOJO MILITISTE GARDATA.

la vojo al Liao-Yang. Persekutataj kaj premataj de l' armeo de Kuroki, kaj poste de tiuj de Nodzu kaj Oku, Rusoj maltaŭenmarŝadas de pozicio al pozicio ĝis la fortikita tendaro Liao-Yang, apud rivero Tsai-tse-ho.

Tie okazas terura batalado dekonutaga (24^{an} de Aŭgusto-4^{an} de Septembro), dum kiu pereis aŭ estis vundataj 32.000 Japanoj kaj 25.000 Rusoj! Ĝi estis bela komenco por Marŝalo Ojama, nomita estre komandanto la 6^{an} de Julio!!

La sukcesoj de Japanoj ne estis ceŝontaj: ili estis ankoraŭ gajnontaj la batalojn de Cha-ho (9^{an}-18^{an} de Oktobro 1904), kaj de Mukden'o. Tiu lasta, komencita la 19^{an} de Februaro 1905 per atako de Kuroki al taĉmentoj de Rennenkampf kaj finita nur la 9^{an} de Marto, ne daŭris malpli ol deknaŭ tagojn! Rusoj perdis 50.000 kaptitojn, 100.000 mortigitojn aŭ vunditojn! Perdoj de Japanoj estis same multnombraj!

Port-Artur'o, post Dalmij, estis fine efektiviginta sian cedon komence de l' jaro; kaj la mara batalado

de Tsuŝima devis definitive ruinigi ŝiparan potencon de Rusujo.

La Kozakoj.

Dum la longa milito, Kozakoj ludis senĉesan rolon, pli malpli sukcesan.

Ili kelkfoje, kiel je l' komenco de la antaŭenmarŝado de l' Japanoj post la elŝipiĝo, provis ĝeni kaj prokrasti la koncentriĝon de l' malamiko. Sed, ĝenerale, ili agadis malmultaj por eksciigi la rusajn estrojn pri la movadoj kaj nombro de japanaj batalontoj.

Pri tiu rolo, jen estas kelkaj linioj eltiritaj de unu el la multaj kaj interesaj leteroj de Generalo Levitskij, rilatantaj taĉmenton de li uzata por sia aparta misio.

« Malamiko ĵaluzeme gardis sian kurtenon, nevideblan reton, kiun oni ne povis trapaŝi, kvankam ŝajnis, ke tio estas



Kopirajto.

JAPANOJ ZORGANTAJ VUNDITAJN RUSOJN.

tre facila! Nevidebla sed fortika kurteno balanciĝis tie en la roza aero de vintra suna mateno.

Kaj tiu ĉi kurteno estis traŝirata! Ĉiutage, pli vere ĉiunokte, ekrajdis Kozakoj por ekpafi Japanojn. Ne unu Kozako perdis la vivon en tiuj ĉi kuraĝaj serĉadoj; ne unu korpo kuŝas sub ligna kruco apud vilaĝoj « Sulubtaj » kaj « Ia-ĝian-he ».

Kaj jen estas trajto, kiu montras ke tiuj Kozakoj estas iafoje grandaj infanoj ne konantaj la danĝeron.

« Inter tiuj simplaj, sinceraj homoj troviĝas herooj. Jen estas pri tio unu ekzemplo.

La 14^{an} de Novembro de l' 1904^a jaro, je l' tagiĝo, la sesa skadro de l' 24^a Don'a kozakregimento, sub komando de Kapitano Karneev, kun oficiroj Ponomarev, Norosileev kaj Popov, eliris por serĉadi antaŭpostenojn de Japanaj linioj. La humoro de ĉiuj estis plialtisma, ĝoja. « Ili trairis la fatalon limon apartigantan niajn postenojn de tiuj de malamikoj kaj eniris en grandan kampon brunflavan el seka gaolĵano. La trunketoj kun rompitaĵoj pintetoj mallaŭte bruetis, enfermantaj rajdistojn. Nur stalaj ponardegoj brilis sub unuaj radioj de l' suno.

Subite el argilaj ĥinaj bariloj, Japanoj komencas rapidan pafadon. La Kozakoj, ekvidinte ke vilaĝo estas okupita de du infanteriaj rotoj, komencis foriri.

Subite, el kampo falĉita ekkuris leporo. Kaj jen kun kriado: « hi — hi, hi — hi », laŭ longe de malamika linio, sub ilia pafila fajro, ekflugis Don'anoj por ĉasi malgrandan manĝurian leporon!

« A - ta - ta!... prenu ĝin, tenu! tenu! » eksonadis krioj; kaj ili, forgesinte pri Japanoj, ekĉasadis la beston.

Kaj Japanoj ĉesis pafi, ekstarigis malantaŭ de la bariloj, rigardis kun mirego la spektaklon strangan, kaj tiun manieron militi kaj ĉasi ».

Tuj kiam komencis interparoladoj por paco, la Rusa milita parto indignis dirante, ke generalo Linieviĉ estas tuta preta, ke armeoj Japanaj estas konsumitaj, kaj ke la sukceso estas certa. Tiel ofte oni diris tiajn parolojn dum la milito, ke multaj personoj, multaj ĉiulandaj gazetoj opiniis ke ili estas supozataj faktoj. Precipe post ribeloj okazintaj sur diversaj punktoj de l' Rusa teritorio, iuj eĉ pensis, ke eble armeo Manĝuria ankaŭ estas laca pri milito kaj deziregas nur pacon kaj ripozon.

Mi estas feliĉa povi citi la eltiraĵon jenan de letero skribita el Gunĉjulin, kaj datumita de l'7^a de Julio; tio estas de epoko kie la opinio de Rusa armeo estis tute sendependa de eŭropaj aŭ amerikaj influoj.

Kune, ni donas kelkajn liniojn, kiuj montras ke, meze de teruraj priokupoj, nia bravega amiko ne forgesis la sanktan esperantistan aferon.

« Kiam tiuj ĉi linioj venos al vi, vi ĉeestos la kongreson en Bulonjo, feliĉa homo.

Vi estos ĉirkaŭigata per miloj da samideanoj; vi interŝanĝos pacajn kaj bonajn vortojn pri amo inter homoj, pri frateco inter vivantoj sur terĝlobo. Bonan sukceson al via kongresa laborado.

Ĉi tiea vivo estas ne pitoreska, sed nur simpla, unutona, malĝoja. Ĉiu tago estas tio, kio estis hieraŭ; kaj nur bataloj ŝanĝas tian nediversecon.

Regimentoj ĉiutage faras ekskursojn por lerni pli bone disbati malamikon. Poste ili laboras je fortikaĵo de pozicio kaj atendas kiam malamiko venos al ili por disbati ĝin kaj venki.

Ĉar nuna tempo ne estas oportuna por antaŭenirado, sekve de periodo de pluvoj, tiam ni pensas ke gravaj aferoj estos dum Aŭgusto.

Mi ne kredas je ebleco de interparolado por paco ĉar, por ni Rusoj, nuna momento estas malprofita momento por fari pacon. Nepre oni devas havi unu venkon kun sukcesa batalo; sen ili neeble estas paroli pri paco. *Nia armeo ne volas aŭdi pri paco: ĝi volas venkan batalon.*»

La Paco.

Malgraŭ tiuj flamaĵoj de l' armeo, Imperiestro rusa decidis akcepti serveman intermeton de Prezidanto Roosevelt. En nia lasta numero, nia lerta kunlaboranto, S^o Gabriel Chavet priparolis longe la traktaton. Ni do nenion rediros pri ĝi.

Punktoj iom nekompreneblaj kiam estis skribata la artikolo estas nun klarigitaj. Ĉiuj konas nune la liniojn de l' Angla-Japana traktato, kiu certigas por Japano la fruktojn, juĝitajn iamomente nesufiĉaj. Eĉ, komence, la spiritoj estis terure ekscitataj en Japanujo kiel en Rusujo.


En Tokio la milita partio incitis ribelon celantan la ekŝigon de l' ministraro kaj la neaprobbon de l' traktato. Montrinte la nediskuteblajn profitojn de tiu ĉi, la regnestraro sukcesis pacigi la spiritojn.

En Kaŭkazo, la situacio estas multe pli grava: la Tataroj kaj Armenianoj reciproke buĉadas sin senkompate. Granda nombro da petrolputoj estas bruligitaj kaj la perdoj altiĝas je centoj da milionoj.

Ni enpresis en la dirita numero vidaĵon de l' naftaj (petrolaj) ekspluatadoj nun parte detruitaj. Malgraŭ energia milita agado la situacio estas ĉiam grava. Estos sendube interese por niaj legantoj legi tion, kion la rusa cenzuro lasis presi pri la malkvietoj en naciaj gazetoj.

Tiuj telegramoj estis sendataj al ni de unu el niaj rusaj korespondantoj, S^o Porfirjev.

« Vilaĝo Padara. Vilaĝo estas detruita de Tataroj; 20 domoj nenigitaj fundamente; vilaĝanoj ĉiuj senindulge turmentitaj; ĉio multekosta disrabitaj; brutaro forpelita; greno forportita; kelkaj homoj mortigitaj. » Telegrafo alportas ankoraŭ pli terurajn sciigojn el urbo Baku.



Kopirajo

DALNIJ.

« Baku (30an de aŭg. 05). En urbaj stratoj daŭras interpafado inter Tataroj, Armenoj kaj rusaj militistoj kaj kozakoj; eĉ l' artilerio pafas. Petrolo kaj domoj de vilaĝanoj brulas; oni pafas el pafitejoj; « profundaĵo » de l' societo disrabas havon de forkuritaj je teruro vilaĝanoj, kaj ĝis nuna momento laŭ oficialaj sciigoj oni bruligis pli ol 3/4 de l' tuta petrolo... »

« Baku (31an de aŭg. matene.)

« Ne timante la energiajn rimedojn entreprenitajn en Baku de guberniestro, S^{ro} Faddjev, por ĉesigo de malordoj, policanoj tataraj uzas la rusajn militistojn por daŭro de sanga batalado; ekzemple, enkurante en domojn de Armenoj, ili de tie pafis per revolveroj kaj poste raportis al militistoj, kaj tiuj lastaj komencis pafadi en armeniajn domojn.

Alia okazo, simila je l' superskribita, estis en Balakany (1); unu Tataro, polica oficisto, raportis ke pafis Armenoj el malsanulejo al patrolo traŭranta la straton; kaj jen rapide oni alveturigis pafitejon! Kaj ne aŭskultante protestojn de doktoro S^{ro} Sejnin kaj de aliaj personoj estantaj en malsanulejo (ĉar en ĝi krom la malsanuloj estis multe da Armenoj, Rusoj kaj vunditoj, kiuj volis kaŝiĝi sub signo de « Ruĝa Kruco »), homoj bestaj faris tri pafojn kontraŭ malsanulejo, lernejo, biblioteko; kaj... ĝemoj kaj senesperaj krioj de vunditoj, malsanuloj kaj de mortantoj miksiĝis kun zumado kaj fajfado de kugloj kaj krakado de falantaj domoj; ĉi tio ĉio kuniĝis en ia unuatempa haoso:.... sango fluis sur la stratoj laŭ larĝa rivero, korpoj de mortigitaj kaj vunditoj kuŝis sur pavimo je spaco da kelkaj metroj; kaj ŝajnis, ke Baku iĝis grandega buĉejo. Kaj Tataroj kaj militistoj elmontris sian kruelegecon; ili mortpafis maljunulojn, patriinojn kune kun iliaj infanoj, infanojn senkulpajn kaj... sango re kaj re estis versata laŭ larĝa rivero!....

Jenajn sciigojn telegrafo alportas al civilizita mondo!

A. PORFIRJEV.

En Japanujo, l' aferoj kvietigas.

Neniu povas antaŭdiri, kio eliros el la imperia « Duma » pri kiu voĉdonadoj prepariĝas.

Ne lasante sin ensorbi de la interna situacio de sia imperio, Caro Nikolaso okupiĝas por kunigo de dua konferenco en Hago.


La afero ne plu estos por preparoli arbitraciajn demandojn, sed reguligi definitive la rajton de nebatallantoj en okazo de konflikto inter du nacioj; ekzameni kaj solvi la diversajn kazojn antaŭmetitajn dum la ĵusa (nova) milito rusa-japana; eviti unuvorte la reigon de okazintaĵoj kaj protestoj tiaj, kiaj tiuj instigitaj de la longa ĉeestado de l' rusa ŝiparo en la golfeto Kamranb.

Pri tiu konferenco, la « *Novoie Vremia* » skribas jenon.

« Oni povas antaŭvidi, ke gravaj malfacilaĵoj ekmontriĝos dum la proksima konferenco. La lasta milito montris kiel grandaj estas la prointeresaj konfliktoj, kiuj restas ankoraŭ en la demandoj pri la neŭtraleco kaj la mara milito inter la diversaj kontinentaj regnoj.

La krosado de Admiralo Rodjestvenskij montris, ek-

(1) *Balakany estas nomo de aŭtaŭloko de Baku.*



Kopirajo.

MUKDEN'O.

zemple, ke la rajto haldi en neŭtralaj havenoj estas viva demando por la landoj de l' kontinento tiam, kiam Anglujo, kun siaj potencaj maraj stacioj konsideras tiun peton kiel neĝustigata.

Same estas pri la kontra-banda demando: dum Japanujo kaj Anglujo havas intereson je tio, ke nutrajaj komercaĵoj ne estu konsideritaj kiel milita kontra-bando, nia vidpunkto estas tute kontraŭa, ĉar Rusujo larĝe provizas sin mem je greno ».

Kio ajn estos, en tiu konferenco partoprenos multaj regnoj flanklasitaj el la unua konferenco, aparte Papo eligita post peto de l' itala reĝo.

Ni deziru, ke tiu konferenco, reparoligante pri l' abomenoj de Milito, akcelu venon de konsenta epoko, al kiu celas ĉiuj koroj de l' bonvolaj homoj.

A. MONTROSIER.

Rusaj kaj japanaj eĥoj.

MILANO. — Japana delegitaro alvenis en Milanon por trakti la kondiĉojn laŭ kiuj Japanujo partoprenos en la ĝenerala ekspozicio decidita pri malfermo de Simplon. La misiistaro havas kiel estron S^{on} M. Makoto Kajishama, delegiton de Japanujo en la Lieĝan ekspozicion.

LONDONO, 7^{an} de Oktobro. — « *Truth* » certigas sciigon ke princo kaj princino de Ualŝo (Walls'o) iros Japanujon post la fino de sia ĉeestado en Hindujo.

Speciala informado de « *L'Eclair* ».

TOKIO, 16^{an} de Oktobro — Imperia skribproklamo pri konkludo de l' paco, estas ĵus publikigita por rajtigi la pacajn terminojn. Ĝi tiel finigis, post laŭdoj por l' armeo, la maristaro kaj la civilaj oficistoj. « Rusujo estas denove la amikino de Japanujo kaj sincere ni deziras, ke najbaraj interrilatoj nunne restarigitaj iĝas intimaj kaj koraj. Je tiu epoko dum kiu la progresoj de l' tutmondo senĉese daŭras, estas necese, ke estu

neniu halttempo en la penadoj por plibonigi l' administracion de l' aferoj de la nacio, internaj kiel eksteraj, dum militistaj kvalitoj devas esti konservataj plenfortike, eĉ ĉe pactempo.

Estas necese fari sincerajn penadojn por sukcesi en la paca fako, tiamaniere ke, paralele je ĝia potenco, la prospereco de l' lando povu esti konservata, kaj ke daŭraj progresoj povu esti certigataj je ĝi.

Niaj regatoj evitu ĉion malhumilan manifestacion kaj ni ordonas al ili fari siajn kutimajn okupojn kaj la eblon por plifortigi la imperion.

Reuter.

PETERBURGO, 17^{an} de Oktobro. — La teksto de l' Portsmouth'a traktato estos oficiale publikigata morgaŭ en « *Bulletin des lois.* »

Havas.

LASTHORE.

Gravaj sciigoj alvenas el Rusujo; ŝajnas ke revolucio prepariĝas. Striko de fervojistoj ĝeneraliĝas kaj kelkaj grandaj urboj, ne plu ricevantaj nutraĵojn, estas minacataj de malsatego. En Peterburgo, la situacio estas aparte timdona. Generalo Trepof, guberniestro, prenis severajn disponojn. Oni certigas ke l' imperia plezurŝipo estas preta por ricevi la imperiestron kaj la imperian familion por veturigi ilin Danujon, se estas necese.

La ĵurnaloj.

Kroniko kaj Bibliografio.

La 2^a Esperantista Kongreso.

La ĉefa fakto de l' pasinta monato estas la konigo pri estonta universala Kongreso esperanta, en 1906. Tiu ĉi okazos en Svisujo, kaj pri tio S^o Schneeberger, la distinginda Prezidanto de l' « Svisa esperantista Societo » sciigas la gazetaron, sendante leteron al li skribitan de Doktoro Zamenhof, kavaliro en la honora legio (1).

Niaj legantoj ne estos surprizitaj eksciante ke, en sia letero, Doktoro Zamenhof konigas sian decidon ĉeesti la kongreson. Ili ja, ne forgesis la plenpromesan manskribitan frazon, skribitan speciale por ili post lia intervjuo kaj komencantan per la ĝojgaj vortoj « *Ĝis revido, karaj samideanoj, en la venonta Kongreso, en la jaro 1906.* » (2). Plie, Doktoro faros gravan proponon pri organizado de speciala sekcio, kiun li opinias tre grava por estonto de Esperanto.

En sia letero Doktoro Zamenhof ankaŭ insistas pri punkto, jam aludita en la suprecitita intervjuo:

« *Mi esperas, ke la svisaj Esperantistoj faros ĉion kion ili povas, por bonege prepari la kongreson kaj fari el ĝi imponantan grandiozan manifestacion de interpopola frateco, grandan feston, en kiu krom la Esperantistoj partoprenos ankaŭ miloj da neesperantistoj, kiuj venos kiel gastoj serĉantaj impreson kaj forivos entuziasmitaj kaj esperantigitaj...* »

Kaj insistante pri tiu punkto, D^o Zamenhof aldonas:

« *Laŭ mia opinio la afero nepre devas esti aranĝita tiamaniere, ke en ĉiuj kunvenoj kaj solenoj, krom la Esperantistoj povu partopreni ankaŭ kiel eble plej multe da ne Esperantistoj (kompreneble ne kiel membroj de nia familio, sed nur kiel gastoj, por difinita pago). Por tio oni devas kiel eble plej frutempe vekii la intereson de la tuta mondo por nia Kongreso per lerte kaj allogge verkilataj gazetaj artikoloj, pri kiuj kredeble zorgos la « Provizora komitato de organizado. »*

Tiu punkto certigas tion, kion ni tiel ofte skribadis. Nur per gazetoj ni povas rapide diskonigi niajn laborojn, la rezultatojn akiritajn. Ĉiuj kiuj povas, do, ne preterlasu okazon kaj agadu ĉe gazetaro. Estas necesege, ke la diversaj tagfolioj kaj revuoj parolu pri la kongreso, kaj sufiĉe multe antaŭ ĝi, por ke la publiko sciu ke granda fakto estas okazonta, kaj ke, sekve, ĝi tre atentigu pri la raportoj poste enpresotaj.

Ankaŭ ke, de nun, ĉiuj penadu por doni ideojn pri rimedoj kapablaj por altiri la atenton pri la kongreso. Oni bonvolu pripensi tion, kion diris nia redaktoro en lia artikolo pri vojaĝo en Anglujon: **Ni estu pitoreskaj, ni estu desegne raportindaj** por ĉiuj ilustrataj revuoj **ne esperantistaj!**

De nun ni opinias, ke estas tute necesege, ke nacikostuma festo partoprenu en la programo de l' estonta kongreso kiel en la unua; sed pli ĝenerala, t. e. ke ĉiuj venu aŭ kun tuta nacia kostumo, aŭ almenaŭ kun kapvesto karakteriza. Tiu ĉi lasta, manke de unua, ne estas kosta; kaj la diverseco de kostumoj aŭ kapvestoj montregas admirindan povon de Esperanto por proksimigi homojn tiel videble malsimilajn per kostumoj, moroj kaj nacilingvaĵoj.

Tre volonte ni kolektos proponojn de niaj legantoj kaj resendos ilin post ekzameno kaj kombino al la organizada komitato; sed oni bonvolu ĉiam aldoni solvojn al proponoj, kaj se eble koston necesan por la efektiviĝo de ĉiu projekto.

La loko de l' kongreso ne estas ankoraŭ elektita sed specialaj informoj permesas al ni diri ke kunvenejo estos kredeinde Genevo.

La sindono kaj aktiveco de Pastro Schneeberger, la lerteco kaj agemo de niaj junaj kunfratoj H. Hodler kaj Privat, ne kalkulaute tiujn de aliaj membroj de l' komitato de S. E. S., donas al ni kaj donos al ĉiuj la plej grandan konfidon en la sukceso de nia dua universala kongreso.

En ĉiuj landoj, oni laboras por utiligi kiel eble plej favore la pasintan kongreson. F^{ino} Lawrence, la sindona, klera kaj agema sekretariino de « Review of Reviews », la grava angla revuo, skribas al S^o Montrosier.

« *Post monatoj, dum kiuj mi provis aranĝi la aferon, mi decidigis la grandan Londonan ĵurnalon, « The Daily News » enpresi ĉiutage ian malgraŭdan sciigon en Esperanto per super-*

signitaj literoj. Estas preskaŭ neeble diri kia granda sukceso estas tio por nia afero en Anglujo. »

Ni ja tre volonte tion kredas kaj instigas lertajn Esperantistojn sendi esperantajetojn, indajn por enpresio, al nia granda angla kunfrato, kiun ni varme gratulas pro ĝia progresema iniciativo. (Sin turni al S^o S. Nicholl, 9, Throgmorton Avenue, London, E. C., England).

El Belgujo, S^o Montrosier ricevis la sekvantan ŝatindan avizon.

MIA KARA KAMARADO,

« *Mi havas la plezuron diri al vi, ke tiun ĉi malenon, mi akta migis en la internacia kongreso de tutmonda disvastiĝo ekonomia, en Mons, la sekvantan voĉdonon:*

La Mons'a Kongreso rekomendas al siaj membroj la lernadon de Esperanto. Tiu lernado estas necesege por tiuj, kiuj volas preparoli kompetente la demandojn pri internacia lingvo, duu lingvo la sama por ĉiuj.

Kvar horojn bezonas meza inteligento por skribi kaj legi Esperanton farante nur kelkajn erarojn.

Kiam tiu unua peno estos farita, oni rekonos, ke plena instruado de Esperanto postulas nur dekdun da lecionoj.

De tiam, la venontaj kongresoj povos akordiĝi por peli enskribon de Esperanto en la lerneajn programojn. »

La 26^{an} de Septembro 1905

KOMANDANTO LEMAIRE.

Apenaŭ reveninte el sia longa kaj fruktoporta esplorado en belgan Kongon, la fervora instiginto de l' belga movado esperantista denove rekomencas bataladi por nia bela afero. Gratulojn kaj dankojn al li.

Jes, celo nia devas esti enkonduki Esperanton en lernejojn, kie estas formataj infanoj « la estonto de Esperanto ». Pri « Esperanto kaj infanoj » parolis jam kelkaj el ni, inter kiuj S^o Carlo Bourlet, Prezidanto de l' Pariza grupo en « The Esperantist », S^o Privat kaj Rektoro Boirac dum la Bulonja Kongreso. S^o Montrosier mem pritraktis longe la demandojn en artikolo de « Turco revue » kaj li montris en unu el la lecionoj de sia kurso de « Annales politiques et littéraires (3) » la grandan helpon alporteban de Esperanto por la cerba kreskado de infanoj.

Ni do laboru por atingi oficialan eniron de Esperanto en lernadajn programojn.

Atendante tiun gravan rezultaton, ni ŝatu kiel ili meritas ĉiujn alpaŝojn: S^o Ducommun, el Les Brenets (Locle) Svisujo, kiu de longe okupiĝis fervore pri la afero, decidis fine famajn imaĝfabrikistojn (Firmo Peilerin kaj K^o—Imagerie d'Epinal), eldoni tri kolorigitajn imaĝojn kun teksto esperanta: « *Obeama kaj jidela hundo, Sanktombro kaj malfamo, La grandegulo*, tre amuzigaj ĉiuj, kaj kiujn ni volus vidi en la manoj de ĉiuj paĉoj kaj manĝoj, de ĉiuj profesoroj de Esperanto kaj de ĉiuj instruistoj amikoj de nia afero. Apud lernejoj estas ofte butikoj de paper-kaj kajervendistoj, kie lernantoj aĉetas paperon, plumojn, kraĵonojn, k. t. p., imaĝojn kaj bonbonojn. La instruistoj konigu al vendistoj niajn esperantajn Epinalimaĝojn, instigante ilin venigi kelkajn kaj ilin elmontri. Estos tie bonega propagando, kaj rimedo por altiri atenton de infanoj kaj gepatroj al Esperanto (4).

La sekvanta eĥo eltirita de l' franca « Esperanto » permesas esperi, ke nia alvoko estos aŭdata.

ĈE INSTRUISTOJ.

« *En Luiko (Luik, Liège, Lüttich) ĵus okazis internacia Kongreso de Instruistoj. Tiu kongreso estis la plej grava el ĉiuj okazinta dum la universala ekspozicio; ĝi enhavis pli ol 7.000 kunvenintojn el dek-sep landoj: Belgujo, Argentino, Germanujo, Franclando, Alĝerio, Ĉilio, Norveglando, Svislando, Kubo, Greklando, Italujo, Hispanujo, Luksemburgo, Bulgarujo, Nederlando, Nederlandaj Indoj kaj Aŭstro-Hungarlando.*

La kongreso finis por ĉiu lando reprezentantan komitaton organizontan internacian Federacion de Instruistoj.

Esperanto estis elektita por paroladoj kaj korespondadoj internaciaj pri tiu temo.

Kun ĝojo ni enpresas tiun bonegan kaj gravan informon. »

Sinjorino DANNE.

(1) Pri nia majstro, ni varme rekomendas al niaj samideanoj, ke ili ĉiam sekvigu lian nomon de la cito: kavaliro en la honora legio, kiam ili parolos pri li en naciaj gazetoj. La franca ordeno, kreita de Imperiestro Napoleono 1^a estas fama en la tuta mondo, kaj tiu fakto, ke l' elpensinto de Esperanto estas honorita de ĝi estas por homoj, kiuj kontentiĝas per paroloj kaj titoloj, tre inda rekomendo. Niaj kunfratoj bonvolu atentigi pri tiu stajn legantojn.

(2) Aŭgusta numero (2^a) de « Tra la Mondo ».

(3) N^o de l' 3^a de Julio 1905.

(4) 100 figuraĵoj afrankite, fr. 3 — 500, fr. 12,50 — Granda rabato por propagandaj komitatoj aŭ revendistoj — Sin turni al « Figurejo, Epinal, France ».

Ni deziras reparoli pri gazetistaraĵ kunvenoj okazintaj dum la Bulonja kongreso.

Ili estis aparte interesaj. Ĉestis: Soj Beauchemin kaj St Martin, Kanado (La Lumo); Samuel Meyer, Francujo (L'Espérantiste); Millidge, Anglujo (The British Esperantist); Aŭgusto Montrosier, Francujo (Tra la Mondo); Fruictier, Francujo (Lingvo Internacia); Borel, Germanujo (Germana esperantisto); Jamin, Belgujo (Belga Sonorilo); Pourcines, Francujo (Est Sportif); Ostrowski, Rusujo (Rusa Esperanto); Schneeberger, Svisujo (Svisa Espero); Privat, Svisujo (Juna Esperantisto); k. t. p.

Prezidis la du kunsidoj Soj Fruictier kaj Paul Nysten, nia malnova esperantista kolego. Inter interesaj decidoj oni interkonsentis pri neakcepto de verkoj ne skribitaj «Zamenhofe»; ĉar esperantaj gazetoj, vere indaj je tiu nomo, ne povas helpi por disigi esprimojn aŭ skribmanierojn fantaziajn kaj ne konformajn al la fundamentoj de Esperanto.

La aŭtoroj bonvolu do zorge ekzameni siajn verkojn kaj, antaŭ ol ilin sendi al revuoj, severe elpeli novaĵojn ne necesajn.

«Esperanto» franca daŭrigas sian progresan marŝadon. Ĝia ofteco, ĝiaj multaj ĉerpejoj por informado, eĉ ĝia telegrafa servo! igos ĝin tre valora por la agado apud gazetaro. Tiu agado estas, mi jam diris kaj senĉese diros, nia ĉefa celo en la

nuna situacio de nia afero. Dankon do al nia «folio» esperantista.

Ni ĝin uzu, represigante en niajn lokajn nacilingvajn ĵurnalojn la sciigojn kapablajn por impresi la publikon. Tiuj ĉi estas tre oportune enhavataj sub formo de tuj utiligeblaj artikoloj en «Esperanto», kiun oni povas aĉeti en ĉiuj kioskoj kaj stacidomaj ĵurnalvendejoj francaj kaj svisaj. (Unu numero: dekcentimoj; 24 numeroj sinsekvaj: 3 fr. por la tuta mondo).

La 3a numero de «Espero Pacifista» enhavas longan artikolon de S^o Gaston Moch: «Kiu volas pacon, preparu... pacon!» instigita de l' tre rimarkita enkonduka artikolo de nia revuo: «Gravaj horoj», de nia ĉefredaktoro.

La loko mankas por detale analizi tiun artikolon, en kiu la aŭtoro opinias maisame kiel S^o Montrosier. Mi do nur diras ke, ja, tiu revuo, aperinta samtempe kiam la nia, estas el la plej interesaj. Ambaŭ, redaktataj laŭ zorge pripensita plano, signas epokon en la historio de nia revuaro. Post propagandaj kaj literaturaj, ni havas, kun «Espero Pacifista», partian revuon, kiu ne cedas je io al similaj nacilingvaj.

Aperonta «Anatomia vortaro» (Je la finiĝo de l' Jaro). La verko kostos 5 frankojn. Oni povas sin turni al nia administracio.

L. EGADAMIRO.

Esperanta Stenografio.

(Unuiga Sistemo Stolze-Schrey)

(EL LA KONGRESA PAROLADO DE S^{ro} D^{ro} ZAMENHOF; STENOGRAMO DE

FR. SCHNEEBERGER-LAUFON (Svisujo).

Antaŭ la oficiala informo, ni eksciis pri la decido de Svisujo inviti Esperantistaron al dua kongreso. Pro diskreta sento facile komprenebla, ni pri ĝi ne volis paroli. Sed ni prokrastis l'enpreson de l' anoncita STENOGRAMO de Pastro Schneeberger, kiu tiel sindone kaj akurate stenografis esperante dum la plenaj kunsidoj de l' Bulonja Kongreso. Jen estas tiu stenogramo kun ĝia esperanta traduko. Ĝi montras la tertecon de l'organizonto de nia 2^a kongreso.

[Handwritten stenographic notes in Esperanto, including the word 'kongreso' and other illegible characters.]

- 1^a En la unua kongreso de l'Esperantistoj estas necese diri kelkajn vortojn pri la ĝisnunaj batalantoj de nia afero; sed antaŭ ol mi
- 2^a parolos pri la batalantoj speciale esperantistaj, mi sentas la devon diri ĉi-tie kelkajn vortojn pri unu homo,
- 3^a kiu havas tre grandajn meritojn en nia afero kaj al kiu la Esperantistoj ofte rilatas malĝuste nur tial, ĉar li,
- 4^a multe farinte por la ideo de lingvo internacia ne apartenas tamen al la amikoj de tiu speciala lingva formo, por kiu
- 5^a ni batalas. Mi parolas pri la tre estiminda S^{ro} Johano Martino Schleyer, la aŭtoro de Volapük. La lingva formo, por kiu laboris tiu
- 6^a respektata maljunulo, montriĝis ne praktika; la vojo kiun li elektis, montriĝis ne bona kaj la afero,
- 7^a por kiu li batalis, baldaŭ falis kaj per sia falo ĝi alportis grandan malutilon al nia ideo entute kaj precipe al tiu speciala
- 8^a formo de l' ideo, por kiu ni batalas. Sed ni devas esti justaj; ni devas taksii ĉiun homon ne laŭ lia nomo aŭ
- 9^a malvenko, sed laŭ liaj laboroj; kaj la laboroj kaj meritoj de S^{ro} Schleyer estis tre grandaj. Kun granda
- 10^a fervoro li laboris por la ideo de lingvo internacia en la daŭro de multaj jaroj; dum multaj personoj donadis nur nudajn projektojn
- 11^a li estis la unua kiu havis sufiĉe da pacienco por ellabori plenan lingvon de la komenco ĝis la fino — kvankam
- 12^a Esperanto tiam estis jam preta, ĝi ne estis ankoraŭ publikigita — kaj ĝi ne estas lia kulpo, se la lingvo montriĝis ne
- 18^a praktika. Li estis la unua kiu per senlaca laborado vekis la intereson de l' mondo por la ideo de lingvo neŭtrala
- 14^a kaj ĝi ne estas lia kulpo, se lia falinta afero por longa tempo malvarmigis la mondon por ĉia arta lingvo.
- 15^a Li volis fari grandan bonon kaj por la atingo de tiu bono li laboris tre multe kaj fervore kaj ni devas lin taksii
- 16^a ne laŭ la sukceso, sed laŭ lia volo kaj laboro. Se la ideo de lingvo internacia iam venkos la mondon, tute egale
- 17^a ĉu ĝi estos sub la formo de Esperanto aŭ de la alia lingvo la nomo de Schleyer okupos ĉiam la plej honoran
- 18^a lokon en la historio de nia ideo kaj tiun-ĉi nomon la mondo neniam forgesos. Mi esperas ke mi esprimas
- 19^a la opiniojn de ĉiuj partoprenantoj en nia kongreso, se mi diros: «Ni esprimas nian koran dankon al S^{ro} Schleyer
- 20^a la unua kaj plej energia pioniro de l'ideo de neŭtrala lingvo internacia!» (Aplaudigoj).

La brava hundo Shippeitaro.

JAPANA RAKONTO (1).

Esperantigita de D^{ro} GAMBIER, el Loudun (Francujo).

La sekvanta historio estas tre konata en ĉiuj partoj de Japanlando, de la antikvaj tempoj. Iom malsamaj rakontoj ekzistas en malsamaj provincoj, sed la plej konata estas tiu ĉi, kiun mi tuj rakontos al vi. La desegnaĵo de la hundo estas kopio de unu antaŭ nelonge publikigita de la fideluloj en Japanujo, kiuj respektigas ĝin kiel « Dio kun larĝa buŝo », kaj konsideras ĝin kiel magiaĵo por forpeli la demonojn kaj la ŝtelistojn.

La Originalo estis, nepre, io kiel hundo Shippeitaro.

Se iafaje la geknaboj kiuj legis tiun ĉi libreton vizitos Japanujon, ili povos vidi ĝin fiksita, ekstere, sur la pordo de kelkaj domoj eĉ nuntempe.



Antaŭ longe, tre longe, ĉe la epoko de la feinoj kaj de la gigantoj, ogroj kaj drakoj, kuraĝaj kavaliroj, kaj fraŭlinoj en danĝero, ĉe tiuj bonaj antaŭaj tagoj, brava juna militisto aliris tra la mondo, malproksimen, serĉante aventurojn.

Dum kelke da tempo li antaŭen iris trovante nenion krom vulgaraĵojn; sed fine, marŝinte en densa arbaro, li trovis sin, ian vesperon, sur la flanko de sovaĝa kaj izolita monto. Nenia

vilago, nenia dometo estas videblaj; eĉ nenia kajuto de karbfaristo. Li estis uzinta vojon kaŝitan kaj longegan, sed fine ĝi malaperis. La vespera krepusko estis komencinta, kaj senutile li provis trovi la malaperintan postsignon. Ĉiu peno ŝajnis nur impliki lin pli kaj pli sen espero en la domarbetojn kaj la altajn herbojn kiuj dense kreskas ĉiuflanke. Senfortigita kaj lacega, li estis duone svenonta, kiam subite li ekvidis malgrandan templon senhoman kaj duone ruinigitan, sed kiu tamen enhavas altaron. Tie ĉi almenaŭ li estus ŝirmata kontraŭ la malvarma roso, kaj li decidis pasigi tie ĉi la nokton. Li havis nenion por manĝi; sed involvinte sin en sian mantelon, kun sia bona glavo apud si, li kuŝiĝis, kaj post nelonge li ekdormis.

Je noktomezo li estis vekata de terura bruego. Unue li kredis ke ĝi estas sonĝo, sed la bruego daŭris; sur la tuta loko resonis la plej teruraj krioj kaj blekegoj. La juna militisto singardeme leviĝis, kaj ekkaptinte sian glavon rigardis tra truon de la

kaduka muro; li vidis strangan kaj teruran vidaĵon. Aro da malbelegaj katoj tie ĉi dancis abomene, kaj iliaj krioj resonis tra la nokto. La juna militisto povis klare aŭdi tiujn jenajn vortojn kunmiksitajn kun la krioj:

« Ne tion diru al Shippeitaro!
Tio restu tute sekreta!
Ne tion diru al Shippeitaro! »

Belega sunlumeco lumigis al tiu stranga vidaĵo kiun la juna militisto rigardis kun miro kaj teruro. Subite, kiam la meznokta horo okazis, la fantomaj katoj malaperis kaj ĉio silentis denove.



La cetero de la nokto pasis kviete kaj la juna militisto profunde dormis ĝis la mateno. Kiam

li ekvidis ke lasuno estas, jam alta li rapidis forlasi la lokon kie la aventuro de la lasta nokto

okazis.

Per tiu brila matena lumo li tuj eltrovis postsignojn de la vojeto, kiu la antaŭan tagon estis nevidebla; li sekvis ĝin kaj tre plezure li vidis ke ĝi kondukas, ne kien li timis, al la arbaro kie li estis hieraŭ, sed al kontraŭa direkto, al ebenaĵo facile trairebla. Tie li vidis unu aŭ du dometojn, kaj iom pli malproksime vilagon. Pro malsato li rapidis kaj estis farinta la plej grandan parton de la vojiro al la vilago, kiam li aŭdis la sonon de virina voĉo kiu laŭte plendas kaj petegas. Tuj kiam la militisto

(1) Eldonita ĉe T. Hasegawa, en Tokio (Japanujo). Laŭ angla traduko de « Review of Reviews ».

aŭdis la plendajn sonojn li forgesis sian malsaton kaj li rapidis al la plej proksima domo por ekscii tion kio okazas, kaj ĉu li povos iel helpi.

Oni aŭskultis liajn demandojn, kaj ĉagrenege skuante la kapon diris al li ke ĉio estas senutila. « Ĉiujare », ili diris, « la demono postulas oferaĵojn; la tempo estas alveninta, kaj la venontan nokton ĝi manĝos nian plej amindan fraŭlinon. Tio estas la kaŭzo de niaj ploroj, ĝemoj kaj plendoj. »

Kaj kiam la juna militisto mirigita pro teruro petis pliaj informojn, ili diris al li ke kiam la suno subiros, la oferaĵo estos enmetata en specon de kaĝo, kaj transportata al tiu ruinigita templo kie li estis paŝiginta la lastan nokton, kaj tie oni ĝin forlasos. Ĉe la mateno ĝi estos malaperinta. Tiel tio okazis ĉiujare, kaj same okazos; nenio povas tion malebligi.

Tion aŭdinte, la juna militisto treege deziris liberigi la fraŭlinon. La cito pri la ruinigita templo estis rememoriginta al li la aventuron de la antaŭa nokto; li demandis ĉu ili iam aŭdis ion pri la nomo Shippeitaro kaj kio ĝi estas.

Shippeitaro estas kuraĝa kaj belega hundo — ili respondis, — ĝi loĝas ĉe la konsilanto de nia Princo, kies domo staras proksime de tie ĉi; ni ofte vidas ĝin, kiu sekvas sian mastron. Ĝi estas brava kaj bela hundo.

La juna militisto ne petis pliajn informojn, sed li rapidis al la mastro de Shippeitaro, kaj petis ke li bonvolu pruntedoni sian hundon por unu nokto. Komence tiu sinjoro ne volis, sed fine akceptis prunte doni Shippeitaron, kondiĉe ke ĝi estu redonita la morgaŭan tagon.

Gojega pro sia sukceso la juna militisto forkondukis la hundon.

Poste li aliris ĉe la gepatrojn de la kompatinda fraŭlino, kaj diris al ili konservi ŝin en ilia domo kaj atenti zorge pri ŝi ĝis lia reveno. Tiam, li lokis hundon Shippeitaron en



la kaĝon, kiu estis preparita por la junulino, kaj helpata de kelkaj el la junuloj el la vilaĝo, transportis ĝin al la ruinigita templo, kaj tie ĝin metis teren. La junuloj rifuzis resti eĉ unu momenton ĉe tiu loko fantomvizitata, sed ili rapidis malsurrampi la monton, kvazaŭ post ili estus aro da fantomoj. La juna militisto sen kunulo krom la hundo tie restis por vidi tion kio okazos.

Je la noktmeza horo, kiam la luno


estis alta en la ĉielo kaj lumigis al la monto, alvenis ankoraŭ pli granda nombro da katoj. Tiun ĉi fojon, meze de ili dika, nigra kato, pli sovaĝa kaj terura ol la aliaj, kaj kiun la juna militisto rekonis kiel la abomenan demonon mem de la monto. Tuj kiam tiu monstra kato ekvidis la kaĝon, ĝi dancis kaj saltis, kun krioj pro triumfa kaj abomena ĝojo imitata de siaj kunuloj. Kiam ĝi sufiĉe mokis kaj turmentis sian oferaĵon, ĝi pretiĝis malfermi la pordon de la kaĝo.

Sed tiun ĉi fojon ĝi trovis iun kapablan interbatali kun ĝi. La brava Shippeitaro elrisortiĝis al ĝi, ekkaptis ĝin per siaj dentoj fortege ĝis la juna militisto per bato de sia bona glavo faligis teren la kapon de l' monstro.

Pri la aliaj katoj, tro mirigitaj por forkuri, ili restis fikse rigardantaj la korpon de sia estro, kaj estis rapide mortigataj de la militisto kaj Shippeitaro. La juna militisto realkondukis la hundon al ĝia mastro kaj milfojedankis lin, diris al la gepatroj de la junulino ke ilia filino estas savita, kaj al la loĝantoj de la vilaĝo ke la demono postulis sian lastan oferaĵon, kaj neniam plu eniĝos ilin. « Vi ŝuldas tion ĉion al la brava Shippeitaro », li aldonis. Dirinte adiaŭ al ili, li foriris por serĉi novajn aventurojn.

D^{ro} GAMBIER.

Represo estas malpermesita.



FELIETONO

La Rememoroj.

de KAZI GIREJ (Manĵurio).

Kontraŭe, li estis tute normala homo, ĉar li estis simila al la plejgranda parto de l' homaro, kiu zorgas nur pri la propraj personaj profitoj, kaj mi apartenis al la malgranda parteto de esceptoj, kiujn la homoj normalaj nomas « stranguloj ».

Nun mi jam ne estas juna. Mi jam antaŭ longe trairis la mezpunkton de mia vivo. Mia kapo estas duongriza kaj mi povas paroli pri miaj intencoj, rigardoj kaj ideoj tute decide, ne timante, ke oni nomas ilin « junulajn revojn »; kaj se eĉ iu nomos ilin tiel, li eraros, ĉar mi mem scias bone, ke mi ne estas juna.

Mi havas por tio ĉi la veran signon. Tiu ĉi signo estas mia amo al la rememoroj. Jes, « kiam la homo estas ankoraŭ juna, li rigardas la vivon antaŭen ĉar li ne scias sian estontecon kaj revas ĉiam pri la estontaj objektoj; kaj tre malofte, li rememoras la pasintan... Tute kontraŭa, la maljuneco! Ĝi iras trankvile la difinitajn vojon, kaj nur kelkfoje rigardas antaŭen por ne perdi la vojon; sed la jam trairita vojo, la pasinta tempo prezentas por la maljunulo la poezian ĉarmon de l' travivita juneco; kaj la rememoroj estas karaj por li.

Mi ankaŭ komencas ami la rememorojn, aparte tie ĉi, en la malproksima fremda lando, kien la sorto elĵetis min antaŭ tri jaroj.

Hodiaŭ mi ricevis leteron el Svedujo, de unu el miaj bonaj amikoj. Tiu ĉi letero revivigas antaŭ mi la plenan pentraĵon de la unuaj jaroj de mia vivo post mia malsano, kaj de mia konatiĝo kun esperantomondo. Mi rememoras kiel, unu jaron post mia resaniĝo, mi atendis la alvenon al mi de la eksterlanda gasto, de l'unua esperantisto, kiun mi ekvidos per la propraj okuloj miaj, kaj kun kiu mi povos, eĉ devos paroli en Esperanto, ĉar li estas alilandano kaj ne scias mian gepatran lingvon, nek mi scias la lian. Jen li venis. Mi konatigas lin kun ĉiuj miaj normalaj konatuloj kaj amikoj, kaj akrasente observas la impreson, kiun li faras inter ili.

Mi estas kontenta, eĉ mi ĝojas, ĉar mi vidas kaj aŭdas, ke ĉiuj laŭdas mian gaston, ĉiuj trovas, ke li estas « interesa » kunparolanto, « agrabla », bone edukita kaj « inteligenta » homo. Ili povas nenion alian aldoni al tiuj ĉi ecoj, ĉar ili ne konas lin sufiĉe; kaj mi povas aldoni, ke li estas ankaŭ la plej honesta homo kun pura animo kaj bonega koro. Mi ekamis lin, kiel fraton kaj mi amas lin ĝis nun.

Ha! mi rememoras scenon, kiun mi neniam forgesos; ni, t. e. mi kaj mia gasto, sidas en la riĉa, lukse aranĝita hejmo de unu grava persono, civila generalo, la prezidanto de la loka noblularo.

Mi vizitis lin, por montri al mia amiko la vivadon de miaj nobluloj.

La generalo, tute griza, ki-l arĝento, sidas apud sia skriba tablo, sencele strekas la paperon per la krajono, kaj parolas kun mia amiko en franca lingvo.

Ĉio iras bone kaj la generalo estas bonhumora. Fine la interparolo trairas al Esperanto kaj la generalo eldiras kelkajn sensignifajn opiniojn, tute konvenajn por grava persono, kaj ĉio estus bonege; sed... terura juneco!... Mia amiko trankvile demandas la generalon: « Kaj vi, via Moŝto, ĉu vi ellernas Esperanton? ».

Mi rigardas per grandaj okuloj mian amikon kaj scieme atendas la generalan respondon. Dume, la generalo daŭrigas streki, rigardante malsupren kaj kun apenaŭ rimarkebla ironia rideto, li respondas, malrapide elparolante la vortojn: « Ne mi an-ko-raŭ ne ko-men-cis... » Li daŭrigas streki kaj rideti. Kaj mia amiko.... Ho, li ŝajnas al mi, tute perdinta la saĝon! Kvazaŭ li ne rimarkis la ironion de la generalo, li daŭrigas sian ekzamenon: « Kial do, via Ekscelenco? sendube vi ne opinias, ke la ideo de internacia lingvo estas malbona; ĉu vi trovas, ke lingvo tia estas neebla? »

Mi faras signojn al mia amiko, sed li nenion rimarkas kaj volas denove ataki la generalon per ia nova « stranga » demando; sed la generalo rapide komprenas la danĝeron; subitely levigas de sia seĝo, kaj petinte al mi pardonon, sub la preteksto de ia rememorigita bezono, eliras el la ĉambro, promesante baldaŭ reveni.

La demando de mia amiko restis sen respondo....

Ho, mia kara, karega amiko!... Vi ankaŭ estas « strangulo », ĉar vi ne komprenis post la unua paŝo, post la unua rigardo, post la unua vorto, ke la generalo estas la plej « normala » homo en la mondo; kaj vi intencis prediki al li la tutmondajn ideojn kaj deziris anigi lin al esperantistaro!

Post kelkaj minutoj, la generalo revenis kaj proponis al ni iom promenadi kun li en la ĝardenon; ni akceptis la inviton, sed ne parolis jam plu pri Esperanto. Tial finiĝis la kuraĝa provo de mia amiko por transformi la maljunan normalan generalon en esperantiston. Baldaŭ post tiu ĉi okazo mia amiko forveturis sian landon kaj mi denove restis la sola esperantano en la loko de mia loĝado, kaj komencis min preparadi al la vojaĝo Svedujon por redoni la viziton al mia gasto.

III.

La jaro pasis rapide; kaj jen la dezirita momento venis, kaj mia revo pri la eksterlanda vojaĝo efektiviĝas. Mi veturas.

Post la fervoja vojaĝo, mi venis al la vaporŝipo, kiu dum du tagoj transportis min tra la grizaj ondoj de l' Baltika maro al la belegaj bordoj de Skandinavujo. Mi apenaŭ kredas je miaj propraj okuloj. Mi estas en Stokholmo? Jes, kaj mi venis tien ĉi nur dank' al Esperanto. La fremdaj, nekonataj homoj ĉirkaŭas min karese, al mi ridetas, kaj premas miajn manojn.

Inter ili, mi vidas la pasintjaran gaston, kiu frate

ĉirkaŭbrakas min, kaj invitas min en sian hejmon. Ni iras kune.

Mi konatiĝas kun ĉiuj la ceteraj, kaj gaja interparolado ne ĉesas ĝis la malfrua vespero. Mi sentas min tiel feliĉe, tiel bone, ke, jam de longe mi ne sentis min tiel antaŭe en mia vivo. Mi rigardas miajn novajn konatojn kiel miajn fratojn, fratojn en spirito, en ideoj, en esperoj...; ŝajne tiu frateco estas la plej forta en la mondo. Post tiu ĉi renkontiĝo, mi komencas vojaĝadojn en Svedujo. Mi vizitadis urbetojn, vilaĝojn, publikajn festenojn, lernejojn, privatajn domojn, minejojn, universitatojn k. t. p. Ĉie mi estis bonkore akceptata kaj konvinkigis, ke la sveda popolo estas treege gastama.

Kiom da impresoj, kaŭzitaĵoj de la faktoj la plej ordinaraĵoj kaj sensignifaj, sed tute nekutimaj, novaj por mi, mi elportis el tiuj ĉi vojaĝoj en Svedujo... Mi memoras ilin ankoraŭ nun, kvankam tio ĉi estis jam antaŭ kvin jaroj.

Jen la sveda milita ministro, maljunulo, en civila kostumo, kiu rajdas tra la strato sur velocipedo... Milita ministro en civila kostumo, rajdanta sur velocipedo!?!...

Mi penas prezenti al mi la militan ministron de mia lando, rajdantan en civila kostumo tra la ĉefurba strato sur velocipedo... Ne, mi ne povas ja imagi tian strangan vidaĵon.

Jen, el la grandega, bela konstruaĵo de l' universitato eliras la studentoj kaj la studentinoj... La lastaj estas sufiĉe multenombraj; ili havas sur la kapo la studentan ĉapelon, same kiel la studentoj... Jen la Reĝo sveda, en civila kostumo, kiu promenas inter la publiko, sur la strato, piede, tute sola...

Jen la ligo studenta-laborista, kiu organizis vesperkunvenon; mi aliras tien kaj rigardas, kiel la studentoj kaj profesoroj dancas kun la edzinoj de laboristoj... Mi aŭskultas la parolojn de memvolaj oratoroj.

Miaj amikoj proponas al mi diveni, kiu parolas, laboristo aŭ profesoro, aŭ studento? Mi ofte eraras, kaj miaj eraroj estas amuzigo por miaj amikoj. En mia lando la sola esprimo «ligo studenta-laborista» estas io terura, kaj miaj samlandanoj preferas tute ne paroli pri similaj objektoj.

Jen, promenante vespere tra la stratoj de l'universitata urbo Upsala, mi aŭdas belan horan kantaĵon. Tie ĉi la kompanio de studentoj kantas « la serenadon » antaŭ la fenestroj de fraŭlino, al kiu ili deziras esprimi sian simpatian. En mia lando, la junularo ankaŭ ĉirkaŭflirtas la belajn knabinojn, sed ne kantas al ili la horajn serenadojn... Tio ĉi ne estas « permesita ».

Jen mi gastas en la domo de sveda bienhavanto. Mi promenas kun la mastro, kaj li montras al mi sian tre malgrandan, sed zorgeme kaj bonege aranĝitan bienhavon, kun tre bela duetaĝa domo, en kiu li mem loĝas ĉiam... Dum la promenado, irante preter la kampoj kaj herbejoj, li forŝiradas la herberetojn, montras ilin al mi, kaj faras al mi tutan kurson pri la apartaj ecoj de ĉiu herbereto; li *divenas* ĝian lokon en botanika sistemo...

Ho! mi pensis tiam, se la terposedantoj de mia lando vivus, simile kiel siaj svedaj kolegoj, ĉiam en siaj propraj bienhavaj hejmoj, kaj sciis la lokojn da herboj kaj semoj en la botanikaj sistemoj! Jen la Upsalaj urbanoj kaj studentoj kiuj aranĝas, en la bela granda verda ĝardeno, la feston de printempo. La « tuta urbo » apudestas. Por eniri ĝardenon, ĉiu aĉetas unu bileton, kostantan unu kronon, kaj la

bileto devas esti alpendita ekstere de la vestaĵo sur la brusto. Tio ĉi anstataŭas la kontrolon: kiu ne havas bileton, ne devas esti en la ĝardeno.

En kelkaj lokoj de la ĝardeno staras grandaj tabloj, kovritaj per blankaj tablotukoj; sur la tabloj estas metita multego da glasetoj, plenaj je bonega sveda punĉo, kaj boteloj je minerala akvo.

Ĉiu apudestanto, kaj apudesti povas nur tiu havanta bileton, povas senpage trinki la punĉon kaj la akvon.

La dezirantaj trinkas, sed mi tute ne vidas la malsobrajn. Mi ne vidas ankaŭ la policistojn, kaj oni klarigas al mi, ke ili ĉeestas neniam en similaj okazoj, ĉar la societo ne bezonas ilin. Jen mi veturas en la vagono de la urba ĉefa fervojo; neniu demandas de mi la monon por la veturado kaj mi mem devas ĝin enjeti en la feran skatolon.

Mi vizitas kelkajn hejmojn de ordinaraĵoj svedaj vilaĝanoj. Iliaj hejmoj preskaŭ ĉiam havas tri malgrandajn ĉambretojn, unu antaŭĉambro, kaj unu kuirejon. Unu ĉambro estas por la familia vivado kaj unu tre pura, hela, zorgeme ornamita, kun blankaj fenestrokurtenoj por akceptado de gastoj. En la familia ĉambro, mi vidas la gazeton. Ĝi kostas ĉirkaŭ du kronoj por la tuta jaro, kaj eliras ĉiusemajne tri fojojn.

Tian gazeton abonas la plimulto el vilaĝanoj.

Ĉiu el priskribitaj scenetoj, kaj aliaj similaj, kiujn mi vidis sed ne priskribis tie ĉi, prezentas nenian apartan intereson, nek gravecon, sed prenitaj kune, ili montras la harmonian unuiĝon en Svedujo de l'administracia, societa kaj popola kultureco; kaj la mirindan simplecon de iliaj reciprokaj rilatoj; ili montras la amon kaj estimon de la sveda popolo al la libereco kaj ordo, justeco kaj vero; ili montras fine, ke la ordemeco de Svedoj ne malhelpas al ili esti tre poezia popolo; tio ĉi vidiĝas el la belegaj popolaj kantoj de tiu ĉi lando, el multaj ĝiaj moroj: printempaj kaj someraj festenoj, kaj aliaj..

O! se mi povus plilongigi mian gastadon en Svedujo!

Feliĉa, ĉarma lando! Lando de paca vivo, de paca laboro, de feliĉaj kantoj... Ĝi ne posedas eterne bluan, turkiskoloran ĉielon, nek luksan naturon kun ĉiam varmega suno, sed ĝia naturo estas majeste bela; ĝia klimato estas sana kaj ĝia popolo ĝuas longan pacon kaj uzas ĉiujn siajn fortojn ne por la tenado de multenombra militistaro, kiun ĝi preskaŭ ne havas kaj ne bezonas havi, sed nur por la disvolvigo kaj plibonigo de ĝia interna bonstato.

Tian staton, Svedujo ĝuas dank al ĝia refuzo de ia ajn politika rolo inter la aliaj mondaj regnoj...

Mi vivadis en Svedujo ĉirkaŭe unu monaton, kaj dum tiu ĉi tempo mi konatiĝis kun multaj esperantoj el la plej diversaj profesioj: tie estis bienhavantoj, artistoj, pastroj, verkistoj, studentoj, kuracistoj, instruantoj kaj aliaj ĉiuj afablaj, bonaj homoj, inteligentaj kaj laboremaj. Mia konatiĝo kun ili nur fortigis mian aldonitecon al Esperanto, kaj eĉ se la societo rigardus ilin kiel « stranguloj » mi deziras ĉiam resti kun ili kaj posedi ĉiam ilian amikecon, ĉar ili plaĉas al mi multe pli, ol homoj « normalaj ».

Tamen por resti kun ili, mi ne devas forgesi Esperanton, ĉar ĝi estas en mia vivo la forto detenanta min de la transformiĝo en la « normalan » homon. Mi do timegas tiun ĉi transformiĝon, kaj tial restos fidela al ESPERANTO ĝis la fino de mia vivo.

(Fino)

KAZI-GIREJ

MIKSAĴOJ.

Por la propagando.



El de «Lusthof».

antaŭ la unu'a, kvazaŭ li ricevus li'a'j'n ordon'o'j'n.

— Bon'vol'u dir'i al mi, kia'j'n person'o'j'n vi vid'as sur tiu ĉi figur'o?

— Sur tiu ĉi figur'o mi vid'as du vir'o'j'n, unu alt'rang'a kaj unu el pli humil'a social'a kondiĉ'o.

— Je kio vi tiel opini'as?

— La unu'a est'as sinjor'e vest'it'a kaj li star'as majstr'e; la du'a hav'as livre'o'n; li klin'ig'as

— Nom'u la vest'pec'o'j'n de l' unu'a vir'o.

— La unu'a vir'o hav'as sur si pantalon'o'n, kol'um'o'n, kravat'o'n, ĉapel'o'n, sur'tut'on, bot'et'o'j'n, ĉemiz'o'n.

— Ĉu vi kred'as, ke li est'as tiel simpl'e vest'it'a? — Oh! ne; sed mi parol'as nur pri objekt'o'j vid'ebl'a'j.

— Kaj la du'a, la serv'ist'o; kiu'j'n vest'o'j'n li port'as?

— La lake'o sur'met'is ĉemiz'o'n, kol'um'o'n, kravat'o'n, ŝtrump'o'j'n, ŝu'o'j'n kun buk'l'o'j, veŝ't'o'n, kaj frak'o'n.

TRA LA MONDO.

Ni konsilas uzi tiajn figurojn por laborigi komencantojn. Tiu procedo multe sukcesis je la lerta franca profesoro, Th. Cart. Post li kaj laŭ lia konsilo mi ankaŭ profite uzis ĝin dum miaj kursoj. Ĝi estas bonega rimedo por atentigi kaj amuzi la lernantojn. Epinalimaĝoj cititaj en la kroniko estas por tio tre rekomendindaj. Ĉiu lernanto povas ricevi kaj konservi unu sen granda elspezo. A. M.

NOVA REGULARO DE NIAJ KONKURSOJ.

1^e Ĉiuj amuzaĵoj, problemoj proponotaj kaj solvoj devas esti sendataj al Sinjoro Ch. Brunet, 59, cours Victor Hugo, Bordeaux, kiu prenis sur sin la redaktadon de la paĝo « Miksaĵoj ».

2^e Krom esceptoj speciale dirotaj, la solvoj devos esti sendataj al S^{ro} Brunet antaŭ la dato montrata post la problemoj; kaj ne 15 tagoj post ricevo de la Revuo.

Ĉiuj legantoj povos sendi solvojn ĉar la templimo estos sufiĉe daŭra.

3^e Divenintoj estos ordigataj, kvaronjare, laŭ la nombro de ĝustaj solvoj senditaj de ĉiu, kaj premioj estos donacataj al la plej sagacaj.

4^e Por iaj konkursoj, aparte gravaj, oni aljuĝos specialajn premiojn.

PROBLEMO 9^a (DE NAZUMULO).

Al la literoj de l' vortoj: sur = turo = loto = relo = truto = carino = roto, aldonu literon kaj vidu novajn vortojn, kiuj estas ĉiuj nomoj de bestoj. Per la unuaj literoj de tiuj nomoj vi povos vidi ankoraŭ okan beston.

PROBLEMO 10^a (DE J. FLOURENS).

Kun mia tuto, mi benas, sen mia kapo, mi brilas, sen mia vosto mi estas molajo.

PROBLEMO 11^a (DE J. FLOURENS).

.
.
.
.
.
.
.
.

Legomo.

Kvanta adjektivo.

Ero de l' virina kostumo.

Dolĉa sento.

Artikolo.

Gramatika finiĝo.

La vortojn oni legas horizontale kaj vertikale.

PROBLEMO 12^a (DE J. FLOURENS).

Antaŭ ĉiu el tiuj ĉi vortoj metu literon kaj vi legos nomon de ilo utila por rajdanto.

iro
ĝi
aro
tero
ondo
fero

PROBLEMO 13^a (DE J. FLOURENS).

Al la vortoj: puto = maŝo = manko = oro = tufo = io = kalo = pentri = kulo = lepro = aldonu literon kaj vi ricevos aliajn vortojn. La aldonitaj literoj montras nomon de bonkonata kaj imitinda esperantisto.

PROBLEMO 14^a (DE MI).

Kun b legomo, kun g arbo, kun r ago.

PROBLEMO 15^a (DE CH. BRUNET).

Al jenaj vortoj, aldonu je ĉiu la nomon de unu el la dek ciferoj 1, 2, 3, 4, 5, 6, 7, 8, 9, 0 kaj denove legu 10 vortojn. Akso = karolo = rapo = neto = ilo = lame = je = peti = dato = virto.

PROBLEMO 16^a (DE CH. BRUNET).

Mia unua estas afikso, mia dua, neado
Mia tria estas disdonilo; ĉiuj ni estas mia tuto.

PROBLEMO 17^a (DE K. K. RI. K.).

Kun kapo mi kantas, sen kapo mi ĉirkaŭas
Sen kapo de l' nova vorto, en mi oni enmetas.

— Kion ni donacos al via patrino, edzineto kara, ĉe ŝia nomfesto?

— Ian veston.

— Ne. Vesto tuj rompiĝas; ni donos al ŝi argentan pleton: tio estas malavara donaco kaj... poste ni ĝin trovos.

10072.

AL NIAJ GELEGANTOJ.

La solvoj de tiuj ĉi problemoj estos akceptataj ĝis la 30^a de Januaro.

Ĉiuj solvoj de la problemoj montritaj ĝis hodiaŭ estos akceptataj ĝis la 30^a de Decembro: tio pro ŝanĝado en nia regularo.

Specialaj premioj estos donacataj por la du unuaj problemoj; serĉu do, gedivenistoj!

Por la kvaronjara ordigo, malgraŭ tiuj specialaj premioj, ĉiuj divenintoj estos rajtigataj.

Pri unu el tiuj lastaj problemoj (mi parolas pri Rebuso), mi avertas ĉiujn kiuj sendis solvon ke ĉiuj eraris, iomete. Ili reserĉu bone kaj ili precipe rigardu bone!

Mi, ankoraŭ, petegas la gelegantaron nur skribi la solvojn poŝtkarte kaj neniam letere.

CH. BRUNET.

Anoncoj kaj reklamoj.

« Tra la Mondo », irante en ĉiujn landojn, impresos anoncojn ĉiulingvajn. Sed la komerca publikigo per Esperanto estas, nedube, la plej taŭga.

PROFITOJ DE LA ESPERANTA PUBLIKIGO. — Ĝi prezentas grandegan profiton kompare je la publikigo per naciaj lingvoj: kontraŭe je tio, kio ofte okazas pri tiu lasta, ĝi estas ĉiam legata, estante legada ekzerco, kaj lernado (pri la teknikaj vortoj) por la adeptoj de la helpa lingvo.

Plie, ĝi donas eniron en ĉiujn landojn al komercistoj ĝin uzantaj.

Ni do tre atentigas la komercistojn pri la utilo de l'esperanta publikigo.

Prezo de nia publikigo.

Anoncoj	De 1 ĝis 3	1 fr.	ĉiulinie.
	3 ĝis 6	0 fr. 90 c	»
	6 ĝis 12	0 fr. 75 c	»
Paĝoj	1 paĝo	140 fr.	
	3 paĝoj ĉiujare	125 fr.	
	6 paĝoj almenaŭ, ĉiujare,	100 fr.	

Reklamoj. — 3 fr. ĉiulinie, kun traduko.

Linimezurilo 7-punkta, kolono da 6,5 centimetroj.

Avizo. — Por publikigo en lingvoj aliaj ol la franca kaj Esperanta, estas rekomendate sendi klišaĵojn, aŭ almenaŭ presitajn tekstojn. La klišaĵoj estas devigitaj por la lingvoj ne uzantaj, tipografie, la francajn preslitterojn.

JUS APERINTA !

FRANÇOIS COPPEE

Unua Ĉapitro

de miaj memorskriboj

ESPERANTIGITA DE
AUGUSTE MONTROSIER



PARZO : 75 CENTIMOJ

PARIS
ALPHONSE LEMERRE, ELDONISTO
23-25, PASSAGE CHOISEUL, 23-25
W. DECKY

Ĉarma verketo de l' fama franca akademiano, kun antaŭparolo tute aproba por Esperanto.

Ĉe « Tra la Mondo ».

Belegaj propagandaj poŝtkartoj kun vidaĵoj de Alĝerio;
1 fr., afrankite, ĉiu dekduo.

Propagandaj poŝtkartoj de « Tra la Mondo », fr. 1,50 ĉiu cento.

ĈE « TRA LA MONDO ».



LEGANTOJ

Se vi volas, ke via revuo prosperu kaj pliboniĝu,
HAVIGU AL ĜI

ANONCOJN REKLAMOJN ABONOJN

Konigu kaj propagandu « Tra la Mondo ». Ne forgesu, ke kiu varbos 6 abonojn ricevos 7^{an} senpagan.

ABONA KONKURSO : PREMIO DA 90 FRANKOJ

PROCENTO AL VARBANTOJ DE REKLAMOJ.

GERMANA ESPERANTISTO.

Organo de diversaj germanaj grupoj esperantistaj (ĉiumonate). Redaktata germane kaj esperante.

Jara abono : 4 frankoj Administracio kaj Redakcio : Esperanto Verlag, Möller & Borel, Berlin, S., 95, Prinzenstrasse.

La Belga Sonorilo

Bonega propaganda revuo : france, flandre, kaj eperantiste.

Oficiala organo de la « Belga Ligo Esperantista » kaj de la Belgaj Ligaj Grupoj.

ABONOJ 4 fr. ĉiujare — Unu n° 0,40 — Kolektoj de antaŭaj jaroj, ĉiu 6,00 fr.

Sin turni al **Se J. COOX, Duffel (Belgij)**

ESPÉRANTISTE

France kaj esperante redaktata, oficiala revuo de la S f p E, 24 paĝoj da teksto, 8 paĝoj da kovriloj kun multajsciigoj pri la grupoj kaj ĉiuspecaj esperantistaj verkoj.

ABONO : En Francujo : 3 fr. estrer Francujo : 3,50 fr.

Sin turni al **Al administranto, Louviers, (Eure), France.**

LEGI EN « Les Annales Politiques et Littéraires »

la kurson pri Esperanto verkitan de Sinjoro Augusto Montrosier. Tiu interesa kaj literatura revuo, tre rekomendinda al personoj lernantaj la francan lingvon, kalkulas en sia kunlaborantaro la plej eminentajn verkistojn.

Ĉiusemajna aldono, dediĉita ĉu al la familio, ĉu pli speciale al la virinoj, pligrandigas la intereson de la revuo, kiu, plue, enhavas ankaŭ ilustritajn paĝojn.

JARA ABONKOSTO :

Kun aldonoj :	(Francujo	10 fr.
	(Poŝta unuiĝo	12 fr. 50
Sen aldono :	(Francujo	6 fr.
	(Poŝta unuiĝo	10 fr.

Sin turni, 15, RUE St GEORGES, PARIS.

LA MIÉLINE GELSON

MIRINDA RIMEDO KONTRAŬ

La Falo de l'Harroj

Ĉe ĉiuj bonaj kombistoj kaj ĉe

FERRÉ, BLOTTIÈRE et Cie
102, rue de Richelieu, Paris.

La malgrandaj anoncoj de « Tra la Mondo ».

Tra la Mondo organizas « anoncetojn » dank' al kiuj ĝiaj legantoj povos facile interkorespondadi. Tiuj anoncetoj enhavas du kategoriojn, t. e. :

1° La ANONCETOJ PRIVATAJ, pri **servpropoj, petoj por oficoj aŭ laboroj** (lecioj, kursoj, geservistoj, k. t. p...);
La proponoj por **intersanĝoj** (poŝtkartoj, poŝtmarkoj, etajoj, sportoj, k. t. p...)
La luigoj da **apartamentoj, domoj, k. t. p.**

2° LA ANONCETOJ KOMERCAJ, rilatantaj ĝenerale la vendon de laboraĵoj, produktoj, aŭ specialaĵoj vendataj de komercistoj.

TARIFO.

Por *privataj anoncetoj* : 0 f. 15 ĉiuvorte por abonintoj kaj 0 f. 30 por neabonintoj.

Por *komercaj anoncoj* : 0 f. 50 ĉiuvorte, por ĉiuj legantoj.

Poŝtmarkoj!!

4. — Kapitano Capé, 74, Faubourg Banner, Orléans, ricevos danke, por siaj soldatoj, ĉiujn ajn legindaĵojn, france presitajn.

5. — Sro A. Morin, Santa Rosa Necoxtla, Ver, Meksikujo, havas kelkajn maloftajn meksikajn poŝtmarkojn kiujn li volonte intersanĝus por maloftaj koloniaj francaj markoj.

6. — Sved — Dan — Norveg — Finlandaj ka alilandaj. Miksaĵoj da 200 po 1 franko. Multaj *Matnovaj Svedaj* en ĉiu aro. La markoj estas sendotaj nur tiam, kiam la mendo estos akompanata de l' pago per poŝta mandato aŭ letere.

Sin turni al P. Hedström, Rossön, Svedujo. (Li ne estas filatelisto).

Sendu mendojn kaj anoncojn kun poŝtaj mandatoj al « Administranto de Tra la Mondo », 15 Boulevard des 2 Gares, Meudon (S. et O.), France, antaŭ la 15^a de ĉiu monato, por la venonta numero.

ĈIAM TRE LEGBLE SKRIBU.

A. J. WITTERYCK, Presisto, Bruĝo.